Joseph Düpjohann,

# La maljuna arbo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Jam multajn jarojn staras
maljuna arbo jen,
ĝi vidis homojn veni
kaj iri sen reven'.

Infanojn ĝoje ludi
ĝi vidis apud si;
sed ankaŭ foje plori
li vidis tiujn ĉi.

La arbo maljuniĝis,
kun tiu ankaŭ mi;
la temp' ne haltas, fluas[2]
estonten daŭre ĝi.

Se iam almetiĝos
estonte la hakil',
vi tiam ne lamentu,
toleru en trankvil'.

*Traduko de la Basgermana poemo "De aolle Boom" de* JOSEPH DÜPJOHANN *(Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1930-10-18) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2003-02-24.*

*MR-400-1 / Arg-248-502 (2004-06-30 15:24:50)*

*Kun afabla permeso de l' aŭtoro, sinjoro Joseph Düpjohan (Ostenfelder Str. 28, D-59302 Oelde, Germanio), prenita el la libro "Liäbensbeller" ("Vivobildoj"), kiu aperis en 1998 en la eldonejo E. Holterdorf, Ruggestr. 27 - 29, D-59302 Oelde, F. R. Germanio.*

[2]aŭ: la tempo ne halteblas,
forfluas daŭre ĝi.